



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Franclingvaj Esperantistoj

JARABONO

Jarabono : 80 fkoj

P. BABIN
Le Haut des Bourrellières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.C.K Nantes : 2.813.61 L
(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1995 — 4


(OKTOBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... aperitivo kun R. Schwartz



... Kaj prahistorio en Malto

KULTURAJ KAJEROJ

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

REDAKCIA KOMITATO:

Jeannine VINCENT
26bis, rue de Milngavie
F-49150 BAUGE

Pierre BABIN
17, rue Romain Rolland
F-85180 CHÂTEAU D'OLONNE

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (A. Frangeul)	2
Aventura vojaĝo (P. Métivier)	3-4
La infano de Lebanono (fino)	5
Prahistoria Malto	6
Kvin ekzotaj virinoj (B. Golden)	7-8
Kristnaska Festeno (R. Schwartz)	9-10
Forge intervjuis Schwartz	11-12
Subkarpataj Rakontoj	13
Por via Distro	14
La Vivo en Gresillon	15-16

EL GRESILLON

En la antaŭa numero de Kulturaĵoj vi povis legi "projekton de kolektiva memorlibro pri la Esperantista Kulturdomo Grésillon". Jen ĝi denove ne nur por instigi la fruajn vizitantojn partopreni en la redaktado de tiu memorlibro, sed ankaŭ por redoni la adreson al kiu la tekstoj estu sendataj ĉar tiu adreso aperis nekompleta.

" Post nur kelkaj jaroj ni celebros la 50-an jubileon de la Esperantista Kulturdomo Grésillon. Celante konservi kaj konigi la historion de ĝiaj fondo kaj frua ekzistado mi proponas ek de nun kolekti kaj stoki

kiel eble plej interesajn kaj diversajn memoraĵojn rakontotajn de vi ĉiuj, kiuj spertis restado(j)n en Grésillon en ĝia frua ekzistoperiodo (1952---jaroj 60): tio kompreneble ne ekskluzivas pli freŝdatajn memoraĵojn, sed ĉi-tiujn ni rezervas por posta etapo.

Do, al viaj skribiloj, tajpiloj, komputiloj. Verku tekstojn daktilografforme 1- ĝis 3-paĝan, prefere en esperanto, kaj sendu ĝin, kun - laŭvole, ne devige - viaj nomo, nuna loĝloko, se eble nigra-blanka (datita) foto de vi, al: Marie-Thérèse Lloancy - B.P.341 64141 - BILLERE CEDEX, Francio.



KULTURAJ KAJEROJ
deziras al ĉiuj siaj amikoj feliĉajn
tagojn dum la venonta jaro.

ESPERANTO TRA LA MONDO

EL FRANCIO – La komunistaj deputitoj en Nacia Asembleo redaktis proponon de leĝo favore al la instruado de esperanto en la unua- kaj duagrada publikaj lernejoj, kiel fakultativa lernobjekto. Laŭ la propono, la lernantoj povus elekti esperanton samrange kiel aliajn lingvojn por la ekzamenoj. Ni esperu, ke tiu propono estos pli sukcesa ol la antaŭe prezentitaj!

La universitato "Blaise Pascal" de Clermont-Ferrand publikigos verkaĵojn de Prof. Pierre Janton, en franca lingvo, titolita: "L.L.Zamenhof: Hillélisme, projet de solution de la question juive". Prezo: 120fr. Adreso: Association des publications de la faculté des Lettres, Université B. Pascal, 29 Bd. Gergovia, 63037 Clermont-Ferrand, Cedex 1, Francio.

La firma "Memory Access", 25, rue Volant, F-92000 Nanterre, ĵus eldonis CD-ROM kun la registraĵo en kvin lingvoj (inter kiuj estas esperanto), de la desegnobendo "Jack Palmer – Un privé dans la nuit" de René Pétillon. Daŭro: kvar horoj; prezo 149 fr.; sendo 30fr. por Eŭropa Unuiĝo.

"Eurokka", F-31450 Donnevill, proponas 44-paĝan novan numeron de "Rok-gazet", kun multaj artikoloj, novaĵoj, recenzoj pri la produktaĵoj de rok-grupoj kaj pop-muziko, inkluzive de la grupoj, kiuj kantas en esperanto; ankaŭ du kompilaĵojn sur diskoj aŭ kasedoj de tiuj esperantlingvaj produktaĵoj. Havebla estas katalogo.

PRI SCIENCIO – De la 2-a ĝis la 8-a de septembro 1996 okazos en Ĉinio, en Beĵing, la 5-a Akademia konferenco en esperanto pri la scienco kaj la teknikoj, sub la patronado de la ĉina Akademio de Sciencoj. La temo estos: "21-a jarcento: nova periodo de scienca kaj teknika evoluo". Krom la prelegoj kaj debatoj estas antaŭviditaj ekspozicio kaj kunvenoj por informaj interŝanĝoj kaj komercaj rilatoj.

Kreita en 1985 la internacilingvaj sciencistoj AIS planas okazigi en 1996 specialajn universitatajn kursojn dum la kongreso universala en Prago, kaj du aliajn studkonferencojn en San Marino (Italio) kaj en Nitra (Slovakio).

Oni preparas novan eldonon de la adresaro "Kiu estas kiu en Scienco kaj Tekniko?". Ĝis nun la redaktoro disponas pri pli ol 600 adresoj de diversaj fakuloj. Oni povas rilati kun Christian Darbellay, Kaiserstr. 43, D-24143 Kiel, Germanio.

NOVAJ ELDONAĴOJ – La Eldona Libro vendejo de Vatikano publikigis du volumojn en esperanto: "Meslibro" kaj "Legajo por dimanĉoj kaj festoj". Proksimume 900 paĝoj, en luksaj bindaĵoj.

"La floroj de l'krepusko", jen la tria romano de Serĝo Elgo, alidire Georges Lagrange. Tragika romano pri amo kaj teroristoj.

"Komputika leksikono", verko, kiu alvenas de Rusio kaj tre certe interesa por la specialistoj de informatiko. La nomo de la terminoj estas ankaŭ indikitaj en la angla lingvo. Aŭtoro: Sergio Pokrovskij.

Aperis la kvara volumo de la "Etimologia vortaro de esperanto" (N-R), de Ebbe Vilborg. Tre serioza prezento de la deveno de la esperantaj radikoj.

Asteriks revenas! Post eldono en tiu nova serio, el Kroatio, de "Asteriks gladiatoro", jen "Asteriks kaj Kleopatra"; ok pliaj titoloj estas anoncigitaj.

"Ĉu vi aŭdis, ke..." de Katalin Smideliusz, teksto kaj kasedo kun legaĵoj por progresantoj.

"Denaska dulingveco, konsiloj por gepatroj" kaj "Dulingve – pli simple". Du kalendaroj por la gepatroj de denaskaj esperantistoj. Aŭtoroj: unua kalendaro, ĉefredaktoro Corsetti; dua kalendaro, Ernő Csizsar.

POR FAMILIOJ – La Printempa Semajno Internacia, tradicia aranĝo de Germana E-Asocio por familioj, okazos inter la 1-a kaj la 8-a de Aprilo, en la mezepoka urbeto Duderstadt. Ĝi okazos kune kun la 2-a Printempa Lernejo Internacia por pli aĝaj infanoj, kun aparta programo. Kontakti: PSI, Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg str. 11, D-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler.

SOMERKURSOJ – Oni intencas oferti plurajn unusemajnajn kursojn al 10-20 ĝeĵunuloj, kiuj poste ricevos diplomon, en aŭgusto aŭ septembro. Ili okazos en la universitato de Santiago de Compostella. Kontakti Prof. Alonso Nunez, Kurso de esperanto, Facultad de Filología, ES-15705 Santiago de Compostella.

AVENTURA VOJAĜO

AL TEMPERE

El la regiono de Grésillon, pli precize el urbeto Loirevala, estas nuntempe simpla afero atingi la kongres-urbon en Finnlando. Aviadile, post du aŭ tri horoj, vi komforte alferigos en Nordeŭropo. tro simple, laŭ mi.... Mi preferis, kvazaŭ nostalgie ĝui la teran kontakton de la trajno.

lun dimanĉon matene komenciĝis mia rulanta migrado. Jen konataj pejzaĝoj: Parizaj stacidomoj kun la rutina bruoj, amasoj daŭre svarmantaj en la severa etoso de la rektliniaj betonaj kajoj.

Momente mi ekriproĉis min: kial mi estas elektinta tiun malrapidan rimedon? Dume, la plimulto atingos la kongreslandon en majesta flugomovo... Tamen, la dumnokta traŭdo de Germanio, kun simpatiaj kaj interesaj kunvojaĝantoj, lasis al mi agrablajn memoraĵojn. Paris-Liege-Aachen-Köln-Hamburg kaj, jen, Puttgarden. En la matena krepusko, la trajno atingas la lastan teran kontinentan stacion. Granda pram-ŝipo atendas tie por trairi la markolon. Kia mirinda spektaklo! La giganta ŝipo malfermiĝas por akcepti la trajnon, kiu glite, senskue eniras la maran monstron, kiu portos nin al Danlando. La manovroj efektiviĝas bonorde kaj baldaŭ la trajno estas solide, sekure ankrita per enormaj feraj katenoj ĉe la planko de la ŝipo. De nun, kvazaŭ flasantan urbeto, la pramŝipo direktiĝas al la dana marbordo.. Post unu horo ni retrovas firman grundon. Baldaŭ ni atingos Kopenhagon. Tie finiĝas la unua etapo de mia vojaĝo. Mi estas duonvoje.

Kun la fervoja bileto en poŝo, mi devas trovi alian trajnon al Stokholmo. Sed, kiam mi konstatas, ke la informoj ricevitaj ĉe la franca fervoja kompanio estas eraraj, kiam mi sciiĝas, ke la promesita trajno foriros du horojn pli malfrue ol anoncite, tiam mi ekmaltrankviliĝas. Mi kalkulas kaj timas, ke ankaŭ la ŝipo ne atendos min por atingi Turku mardon matene. Mi provis pridemandi fervojistajn oficistojn en Kopenhago, sed neniu komprenis min. Mi amare konstatis, ke la fama

franca lingvo estas simple ignorata. Oni demandis min: "Ĉu vi parolas angle?" Humile mi devis respondi: "Ne." kaj tiam oni, per malestima gesto, forlasis min senresponde. Momente mi sentis min sola sur la kajo. La stacidomo perdis sian romantikecon. Fakte tiuj grandurbaj stacidomoj prezentas trajtojn pli-malpli similajn: rulantaj ŝtuparoj kondukas supren aŭ suben al la granda halo, tien kien alvenas la amaso da uzantoj, establiĝas pli gastama rilato kun la urbo... Bone, sed tie ne troviĝas la solvo de mia problemoj. La ĉefa obstaklo tiam estis la lingva barilo. Pitor-eska sed komplika Eŭropo! Fine, usonano, hazarde kontaktita, eksciinta pri mia maltrankvilo, diris, al mi en tre korekta franca lingvo: "Ne malesperu! Povas esti, ke en Stokholmo troviĝos ankoraŭ ŝipo, kiu foriros al Turku. Sed, tiam, mi konsilas al vi uzi taksion ĉar estas plurkilometra distanco por atingi la havenon". De nun mia vojaĝo aperas al mi tute alia. Mi konstatas, ke mi devas ĉiam kuri, pripensi, kalkuli. Mi pensis pri la romano de Jules Verne, kies herooj baraktis dum 80 tagoj por ĉirkaŭiri la terglobo.

Bone, denove mi estas en trajno. Unu horon post Kopenhago, ni trairas novan markolon: Helsingor - Helsingborg. Similaj manovroj sur la pramŝipo kaj la trajno glitas, rulas sur la sveda teritorio ĝis Stokholmo. Malgraŭ problemoj mi ne neglektis rigardi la svedan kamparon. Mi firme pensis! Mi devas alveni ĝustatempe. En mia menso, mi formulis argumentojn. Mi estis preta montri al la trajnestroj la atestilon de hotel-rezervado por devigi ilin konduki min al la celo! Okazis ankaŭ, ke koncerne tiun duan duonon de la vojaĝo mi ne rezervis sidlokon. Malafabla persono lanĉis al mi, germanlingve: "Foriru!". Mi nun atendis pacience kaj mi malkovris rezervitan, sed ne okupatan, sidlokon. Tiel mi komforte atingis Stokholmon. Plian fojon solviĝis problemoj! En Danio kaj en Svedio mi konstatis, ke plejofte oficas kontrolistoj sur la trajno. Vespere de la dua tago, jen Stokholmo! Denove problemoj pri la lingvo. Kompatinda franca lingvo, kies iama famo jam de longe estingiĝis! Surprize kaj feliĉe mi spertis, ke la itala lingvo estas sufiĉe uzata. Tio savis min plurfoje. Dum tiu vojaĝo mi neniam povis vere ripozi. Bonŝance ni trovis taksion por veturi al la haveno. Ĉu estas ankoraŭ ŝipo por Finn-

lando? Turku? Post rapida horaro-konsultado: jes! Ĉe la kompanio: Viking Line foriras la lasta ŝipo. Rapidu! Majeste atendas giganta belega ŝipo: "Amorella". Ankaŭ bela nomo. Kia belaĵo! Granda kiel transoceana ŝipo; eble 150-metrojn longa, 7 etaĝojn alta, kun multaj liftoj, kajutoj, salonoj, kafejo, butikoj. Vera flosanta urbo.


Estas la 9-a horo vespere. Eble mil pasaĝeroj viciĝas kun dumil valizoj! Oni malrapide sed obstine puŝas la valizojn... kaj ankaŭ la najbarojn! Mi aŭdas multajn lingvojn; ne la francan sed denove apud mi sonoras la itala. Sed ĝis nun mi neniam aŭdis Esperanton. Mi estas vere sola en amaso fremda.

Jen montriĝas pliaj problemoj: mia fervoja bileto indikas "ĝis Turku", do entenas la perŝipan parton de la vojaĝo. Ĉe la ĝiĉeto oni tro atenteme esploras miajn paperojn. Ŝajne, oni dubas pri ilia valideco. Mi nenion komprenas. Finfine, oni akceptas min. Mi rajtas trairi la Baltan Maron. La ŝipa vojaĝo ne estas tre rapida (11 horojn), sed kvizaŭ glitas sur velura tapiŝo. La nokto neniam fariĝas vere nokta. Ni laŭiras tre proksime la Aland-arkipelagon, finnlandan teritorion. Ni vidas centojn da insuloj. Kelkaj estas tute malgrandaj, eĉ ne loĝataj. Aliaj surhavas urbetojn. Tie oni parolas svede.

Je la 8-a horo matene la ŝipo albridiĝas en Turku. Finfine, mi estas en Finnlando. La ĉefa afero! Nun mi estas en Esperantio. Tuj ĉe la alveno, sur la placo, atendas buso, kie mi aŭdas esperantajn voĉojn. Mi estas savita. Finiĝintaj la problemoj! Mi ne plu estas fremdulo izolita.

Tamen mi ne bedaŭras mian elekton pri la vojaĝo. Estis riĉa, memorinda sperto. Dum la tuta tempo mi estis proksima spektanto de plej variaj vivo-aktivaĵoj kaj mi klopodas memori kaj kompreni ĉiujn facetojn de tiu bunta vivo-vibrado. Haltos tie mia rakontado. De nun mi estas unu el tiuj feliĉuloj, kiuj ĝuas la perfektan aranĝon de la antaŭ-kongreso en Turku dum 4 tagoj. Same interesa kaj perfekte aranĝita estas ankaŭ la semajno de la Kongreso en Tampere. Al tiuj, kiuj ne legos tion, la ekster-esperanta amaso, mi nur deziras, ke ili ankaŭ foje fariĝu anoj de nia internacia rondo por juĝi kaj kompreni la realecan forton de Esperanto.

Pierre METIVIER



LA INFANO

DE LEBANONO

FINO

"Se almenaŭ ci povus paroli! Plaĉus al mi koni la koloron de via voĉo. Se almenaŭ ci kapjesus aŭ kapneus, kiam mi cin pride-mandas! Eĵ! Mi ekhavas ideon. Skribu ion al mi, por ke mi almenaŭ sciu ĉu ci havas pensojn. Al la ceteraj mi respondas anstataŭe kaj mi nescias, ĉu mi parolas la veron. Nasim, mi juras al ci, ke ci estas mia frato. Ne iu frato ludmaniera, sed vera. Kaj ci estas mia plej bona amiko. Tamen ja laciga estas amiko, kiu eĉ ne palpebrumas por sciigi al mi, ke li min aŭdas....Kiam do venos tiu ŝoko, kiu cin priligos? Ci ne volas diri al mi, ĉu mi estas cia plej bona amiko, ĉu?" Ho mildaj paroloj al mi persone dediĉita! Ĉion mi ricevis el mia Ĵad, nenion reciprokante. Paralizite de mia muteco mi estis forgesinta, ke ankaŭ la signoj estas aliro, ligo, esprimokodo. Mi furioze kapokuis por jesi, tiel malligante mian silenton el ĝia soleco. Ĵad senmovigis min. Kun terurĝinta voĉo: "Haltu! Ci estas ĝin malkroĉonta! Ne malebligu, ke mi feliĉas. Nu, la unuan fojon vi ridetas. Kiam ci ridetas, -ĉu ci volas, ke mi diru ĝin? Ci estas mia plej bela frato el la mondo."

La duan fojon, kiam Ĵad estis vokita al la vizitejo, mi ne moviĝis pli, ol la unuan fojon. Li forpafiĝis, tute ĝojfrenezigita. Io flustris al mi, ke li estas reaperronta samrapide, kiel li estas forkurinta. Fakte li ekimpetis. "Ĉu ci scias kion diris Paĉjo? Li diris." Ha! Ĉu ci venas sola? Kie do li estas, cia frato Nasim?" Rapidu! Rapidu! Per Alaho, kia malrapidemulo ci estas! Mi petas, li atendas nin." Mi ne havis la vivecon kaj senpaciencon de Ĵad vid-alvide al la propraj feliĉaĵoj. Fakte je tio mi ne kredis. Insida voĉeto senlace ripetadis: li nin atendas hodiaŭ, sed morgaŭ, kiam ili foriros ververe, ili starigos ian "nin" ambaŭ kune, kaj mortos mi, ja certe mortos mi.

Kiel la unuan fojon li ekstaris, kiam ni alvenis kaj mi impetis en liajn brakojn. Tiuminute mi ekkomprenis, ke mi estis lin atendinta kun la sama intenseco, kiel lia

filo. Tiun patron mi amis laŭ la sama maniero, kiel Ĵad. Li prenis mian vizaĝon inter siaj manoj, lin mi avide trinkis per la rigardo. Mi volis, ke li diru al mi: "Ci estas mia." Ho, Dio! Kiomforte mi volis aparteni al li! Ververe, por ĉiam; por esti certa, ke li ne forprenos de mi Ĵad-on.

Nenion li diris. Li elpoŝigis du miniaturnajn veturilojn kaj ilin tendis al ni kun rideto. Mi prenis la mian per tremanta mano. Jen donaco! Donaco al mi, Nasim. Dum aĉetado li estis pensinta pri ambaŭ ni, pri ambaŭ ni kune, pri Ĵad kaj Nasim. Mi do ekzistis por li ekster tiu vizitejo. Mi denove rigardis lin. Li amis min, Tiuminute mi certis pri tio; lia rideto ĝin diris al mi; lia mano sur miaj haroj ĝin diris al mi; lia donaco en mia mano ĝin diris al mi. Ili amis min, li kaj Ĵad. Tio estis nemezurebla, tio estis rea ekeŝtigo, tio estis mia vilaĝo al mi, tiel revenanta. Jen ĉio, kio gravis en la nunto.

Mi timide vokis: "Ĵad, ĉu tio estas ci?" Mi ne scipovas priskribi, kiel li mienis, kiam li aŭdis mian voĉon. Sekundon, nekredibleco lin senmovigis, poste li turbis kantante: "Ho patrinjo, ho panjo, jen tio sukcesis...tio sukcesis..." Li iris skui la manikon de fratulino Maria, kiu ankoraŭ ne kuraĝis enmiksiĝi. "Ĉu vi aŭdis? Li parolas.. Li parolas...! Mi petas, fratulino, ĉu ci ne bonvolus iri al mia paĉjo por tion diri al li? Ĉar al Nasim devas diri mi, ci ja scias-pri kio." Ŝi kisis al Ĵad kaj karesis al mi la harojn. Ŝia mano por ni daŭre fremdis. Tial, ke jam de tro longe oni kredas, oni pensas, ke sola oni estas, oni ne plu scipovas rekoni la korojn de la aliaj. Frakasite de tia emocioflugo kaj samgrade, kiel Ĵad mirkonsternite pro la reveno de mia voĉo, mi perdis, kiel mia patro, la nordon, sudon, orienton kaj okcidenton. Mi jam ne volis kompreni; tio kaŭzis al mi troan perturbecon en la animo. Mi nescias kial, mi pensis pri mia desegnaĵo kaj preskaŭ demandis al Ĵad, ĉu li ĝin kunportos. Tiu ideo revekis mian doloron kaj, anstataŭ kriu, mi ekploris. Ĵad sidigis apud mi surgrunde. Li anoncis solenatone: "Mi volas diri al ci ion, pro kio ci jam ne plu ploras. Ci nescias, ĉu? Aŭskultu, Nasim. Paĉjo kunprenas ambaŭ nin de ĉi tie por ĉiam." Ambaŭ nin...por ĉiam... Nemezureblan tempon mi bezonis por kompreni. Gojejoj samkiel doloregoj stumblas ĉe abrupteco de l'rivelo. Oni aŭdas la vortojn, ties signifon

(sekvo paĝo 8)

PRAHISTORIA MALTO

La prahistoriaj postsignoj ekzistantaj sur la tri ĉefaj insuloj (Malta, Gozo, Comino), permesas diri, ke homoj vivis tie jam 5 000 jarojn antaŭ nia erao. Tiam agrikulturistoj, ofte ankaŭ maristoj, kiuj serĉis senhomajn landojn, transiris la 90-kilometrojn larĝan markolon inter Sicilio kaj Malto. Tiuj enmigrintoj kunportis brutaron, semojn kaj ilojn. Dank'al ili tiuj mikroskopaj insuloj, aspekte ne havantaj ian naturan riĉaĵon, spertis eksterordinaran historion kaj verŝajne estis la centro de la mediteranea civilizacio, antaŭ la apogeo de la Egea, de la Kreta kaj de la Micena civilizacioj.

Tri grandaj epokoj konsistigas la prahistorian periodon: la neolitika, la kupro-epoko kaj la bronzo-epoko.

La neolitika epoko: La tiamaj "farmistoj" jam bone konis brut-bredadon kaj kultivadon, ĉar estis malkovritaj ostoj de mamuloj, semoj de tritiko, de hordeo kaj lentioj. Ili ankaŭ estis fiŝkaptistoj kaj ĉasistoj. Ĉar surloke ili trovis nur ŝtonojn ili importis silikblokojn el Lipari-insuloj kaj lafablokojn el Etna-vulkano por la fabrikado de muelŝtonoj. En Ghar Dalam, groto apud Bizzebbuga, oni malkovris la unuan prahistorian meblaron. La potoj, brunaj aŭ grizaj, estis ornamitaj per desegnatraj skulptitaj en krudan argilon. En Skorba Arise la potoj estas malpli riĉe ornamitaj sed ili estas poluritaj ruĝkoloro.

La kupro-epoko: Novaj konkerantoj alvenintaj el Sicilio ŝanĝis la kulturen tradicion de Malto. La potoj estas grizaj, brunaj aŭ helflavaj kun ornamaĵoj gravuritaj en la argilon kaj kolorigitaj ruĝaj. Poste la desegnaĵoj ŝanĝiĝis: ili fariĝis kometformaj kaj spiralaĵoj... Dum tiu epoko la tiea popolo enterigas la mortintojn en komunajn tombojn fositajn en la roko. Poste estis fositaj tomboj en la kalka ŝtono de la insulo; la hipogeo de Hal Safkleni montras tomboĉambrojn riĉe ornamitajn, kiuj okupis surfacon de 160 kvadrataj metroj kaj verŝajne akceptis la postrestaĵojn de 6 000 personoj. La kolosa arkitekturo de la temploj en Malto kaj Gozo estas unika. Ĝi postulis gigantan laboron, ĉar pezegaj

ŝtonoj estis transportitaj longdistance kvankam tiam ekzistis nur simplaj iloj. Tamen oni malkovris globformajn ŝtonojn sur kiuj estis verŝajne rulitaj la dikaj ŝtonoj; tiuj konstru-ŝtonoj montras en tranĉaĵojn en kiujn estis enigitaj levstangoj. Pensu ke la eksteraj muroj de tiuj temploj altas ĝis ses metroj. Tiuj temploj ŝajne ne utilis, kiel tombejoj sed kiel religiaj konstruaĵoj. Tion indikas la eltrovo de tranĉiloj el ŝtono, trinkvazoj kaj mur-skulptaĵoj; la ĉeesto de statuoj prezentantaj dikajn virinojn supozigas, ke la tieaj homoj kultis fekundecon. La temploj enhavis du "sektorojn": unu publikan, alian dediĉitan al incitoj. Tramuraj aperturoj pensigas, ke, tra tiuj truoj, la pastroj diris orakolojn kaj vokis la helpojn de resanigistaj dioj.

La bronzo-epoko: Dumil jarojn a.K. la temploj estis forlasitaj. Malaperis la loĝantaro pacema kaj farema. Ĉu pro epidemioj, klimat-ŝanĝiĝoj, malsato aŭ alveno de invadantoj el Grekujo? Malaperis la dolikocefalaj homoj tieaj kaj aperis brakicefalaj militemuloj. La kulturo de tiuj novalvenintoj estis tute malsimila ol la tie reganta.

Tiu epoko dividiĝas en tri periodoj pro la alveno de diversdevenaj konkerantoj. Pri la unua periodo estis trovitaj restaĵoj de vestaĵoj kaj juveloj; ankaŭ de homaj cindroj deponitaj en urnoj. La unuan fojon en Malto kelkaj iloj estis faritaj el metalo. La tiamaj popolo, pli batalema ol la antaŭa, konstruis nur doĉmenojn. La potoj el polurita fajenco estis ornamitaj per geometriaj desegnaĵoj. Ankaŭ statuetojn oni trovis.

Ĉe la fino de la 2-a jarmilo a.K. evenis el Sicilio nova popolo, kiu konstruis vilaĝojn sur la ebena supro de montoj. Ĉiu vilaĝo estis ĉirkaŭita de fortikaj muroj. La tie trovitaj ceramikaĵoj estas flav-brunaj. Tiam disvolviĝis teks-industrio. Verŝajne de tiu epoko datiĝas la famaj "cart-ruts", vojsulkoj faritaj de stangoj interligitaj, uzitaj por treni pezajn ŝarĝojn; tiuj stangoj gravuris siajn ir- kaj revenvojaĝojn sur vastaj surfacoj de nuda roko. Samtempe, kiel tiuj popoloj, alia popolo veninta el suda Italio instalĝis sur la okcidenta parto de la insulo. Iliaj potaĵoj estis farbitaj nigraj aŭ grizaj kaj la far-tekniko similas tiun de la Kalabriaj metiistoj.

(fino paĝo 8)

KVIN EKZOTAJ VIRINOJ

EN LA ESPERANTA BELETRO

Bernard Golden

Tiu ĉi artikolo havas la formon de literatura divenludo pri kvin virinoj pri-skribitaj de esperantistaj aŭtoroj kaj tradukintoj. Unu virino vivis en proksimorienta lando en la antikveco; du estis loĝantoj de po unu lando de la Centra kaj Ekstrema Oriento; la hejmlando de la kvara estis Oceanio; la agado de la lasta okazis sur unu el la planedoj de nia sunsistemo. Tiuj ekzotaj rolantinoj aperas en verkoj de kvin diversdevenaj aŭtoroj: po unu aŭstraliano, bengalano, ĉino, germano kaj usonano. Inter la kvin verkoj, tri estas romanoj verkitaĵe originale en Esperanto, kaj la aliaj du estas noveloj tradukitaĵe el po unu azia lingvo. Ĉu vi povas identigi la virinojn, la verkojn kaj la aŭtorojn?

a) "Kiam li alproksimiĝis, du blankaj manoj, ornamitaj per multekostaj ringoj, disŝovis la kurtenojn kaj vidigis en facila duonlumo la vizaĝon kaj la formon de eksterordinare bela virino. Ŝia beleco estis la matura beleco de virino jam preter la fruaj jaroj de junula ĉarmo. Ŝi aspektis, kiel virino konscia pri neordinaraj allogeco kaj inteligenteco, kaj plue, konscia pri la potenco, kiun donas ĉi tiuj naturaj ecoj. Abundaj, ruĝebrownaj haroj, ligitaj nur ĉe la frunto per orfadena rubando, kovris ŝiajn ŝultrojn, kaj kelkaj bukloj falis sur la bruston kaj nudajn belformajn brakojn. Ŝi estis bonguste vestita per blanka, tunik-simila kaj zonita vesto. Laŭforme ŝia vesto ne multe diferencis de vira tuniko, sed ĝi estis tre arte kaj bele subroditita per oraj kaj koloraj fadenoj, kaj havis frangojn ĉe la malsupro kaj ĉe la ŝultroj. La vesto atingis ĝis malsupre de la genuoj, kaj vidigis blankan, vastan pantalonon, kunfalditan ĉe la maleoloj. La sandale vestitaj piedoj estis ornamitaj per juveloj. De braceleto pendis malgranda, cilindroforma sigelilo."

b) "...antaŭ mi staris belega junulino tiel perfekte bildigita, ke mi forgesis, ke ĝi povas esti nur ŝia reflektajo. Kun escepto de tiu aparato sur ŝia kapo simila al tiu sur Mako, premita sur ŝian dikajn, belan orflavan hararon, ŝi estis vestita simile al iu greka dancistino. Ŝia mallonga vesto estis

palblua kaj ĉirkaŭ ŝia talio estis pli helblua ŝnurego, kvazaŭ el silko, la du finoj kunligitaĵe ĉe ŝia maldekstra kokso, du kvastoj pendantaj duone ĝis ŝiaj genuoj. Tiu ŝnur-ego servis por pli klare vidigi ŝiajn belformitajn koksojn, eĉ la tuton de ŝia perfekta korpo. La vesto kovris ŝian korpon nur ĝis la genuoj. Mi tiam, surprizita, rimarkis, ke ŝiaj tibikarnoj kaj malgrandaj piedoj estas ne vestitaj.... Ŝiaj belegaj trajtoj, varmigitaj per la plej dolĉa, bonkora rideto, kiun mi iam vidis, estis tiel brile belaj, ke mi povis nur stari tie, senvorte mirigita."

c) "... Ŝia hararo estis tinkturita hele brikruga, dum ŝiaj brakoj, vizaĝo kaj dorso estis oranĝkoloraj.

Ĉirkaŭ ŝiaj brakoj estis volvitaj longaj ĉenoj el konkoj, kaj ĉirkaŭ ŝia talio ŝi portis zonon el hundaj dentoj, sub kiu pendis du pezaj antaŭtukoj el konkoj. Ĉirkaŭ ŝiaj mamoj ŝi portis zonon el brilaj, sekaj, ruĝaj beroj garnitan per multaj strangaj ornamaĵoj.

Kiaj strangaj aferoj ornamis ŝiajn brakringojn! - porcelanaj pipoj, tranĉiloj, forkoj, kuleroj, kombiloj kaj malgrandaj speguloj - la fremdaj posedaĵoj neniam uzitaj krom por ornamo edziniĝonton.

Hirta diademo el hundodontoj sidis sur tiu kapo, kies juna sensulka vizaĝo, kutime tiel ĉarma kaj senornama, kvankam multe tatuita, ridetis rekone al mi, silente suferante la malkomforton de la akraj kaj pezaj ornamaĵoj. La diademo subtenis grandegan kronon el miloj da uranornisaj plumoj, kies belaj koloroj brilis en la sunlumo.

De la streĉitaj lomboj de ŝiaj oreloj pendis amasoj de la kutimaj hundodontoj, kaj de la longa maldika peco de osto puŝita tra truo en la vando de la nazo grapolis granda amaso de hele koloraj konkoj."

ĉ) "... mi eĉ vidis mian amantinon por momento tiel same kiel oni vidas iun en tondrolumo. Ŝi portis belan safirkoloran veston kaj ŝiaj belaj piedoj portis belornamitajn ŝuojn, sur ŝia brusto vidigis la ornamaĵo, bela ruĝa ĉapo kovris ŝian kapon, kaj orkolora vualo tre delikate kovris ŝian blankan frunton.

Ŝi kvazaŭ ebrigiis min kaj mi ĉiam deziris renkonti ŝin, kaj tiel en la iluzi plena ĉambraro mi nokte travagadis. ...subite mi vidis ŝin, la persan belulinon, apud mia figuro en la spegulo, ŝi kliniĝis kaj montris sian amoran deziron per siaj okuloj, sur ŝiaj

belegaj maldikaj lipoj freŝaj estis parol-signoj neaŭdeblaj, ŝi gracie moviĝis por montri sian belegan korpon floranĉan pro juneco, sed subite ŝi malaperis en la spegulo; ŝia miĉo estis plena de kordoloro kaj pro deziro kaj pro necertece; ŝia ridetplena rigardo kvazaŭ ŝprucis al mi."

d) "Ŝi ne naskiĝis en Luĝen. Iun jaron, ĉe la komenco de vintro, en la domo de mia kvara onklo, oni volis dungi novan servistinojn; tial maljunulino Vej, la peristino, ŝin alkondukis. Ŝi kunligis sian hararon per blanka lanfadeno pro funebro, surhavis nigran jupon, bluan bluzon subŝtofitan kaj palbluan veŝton. Ŝi havis dudek-ses aŭ -sep jarojn. Ŝia vizaĝo estis palflava, sed sur la vangoj restis ankoraŭ iom da rozkoloro. Maljunulino Vej, nomis ŝin Bofratino Hianglin kaj klarigis, ke ŝi estas najbaro de ŝia patro domo, nun ĉar ŝia edzo mortis, tial ŝi forlasis sian hejmon por dungiĝi kiel servistino. Tion aŭdinte, mia onklo suligis la brovojn. Onklino komprenis, ke li malŝatas vidvinojn. Sed ŝi rimarkis, ke ŝi havas regulan aspekton, fortikajn membrojn kaj ĉiam rigardis al la tero senparole. Ŝi ŝajnis esti nepostulema kaj laborema virino. Tial la onklino ne atentis la brovkuntirigon de la onklo kaj akceptis ŝin en la domon. Dum la prova periodo, ŝi laboris tuttage, kvazaŭ ŝi enuus pro senfareco. Ŝi estis forta kaj ŝia laboro egalas tiun de viro."

RESPONDOJ


a) Okaze de la alveno de karavano en Padar, estas renkontiĝo inter Zalmuna, la riĉa akad-devena virino, kun Omar, kiu foje savis ŝian vivon. Heinrich A. Luyken, angligita germano, rakontas pri la antikva Babilonio en sia romano "Pro Istar" (1924)

b) Neldi de Zenolando, sur la planedo Marso, aperas al la ĵurnalisto Vilĉo Vilson dum li rigardas la ekranon de respugula televidaparato funkcianta per lumradioj. Iliaj postaj aventuroj sur Marso estas pri-skribitaj en la romano "Invito al Ĉielo" verkita en Esperanto de la usonano James Sayers (1949).

c) La bela Silia preparas sin por edziniĝi al Labadu, en Kananam, indiĝena vilaĝo en la norda parto de Nov-Gineo. La aŭstraliano Kenneth G. Linton skribas pri tiu insulo en Oceanio en sia autobiografia romano "Kananako en Kananam" (1960)

ĉ) En la rakonto "Malsata Ŝtono", impost-kolektisto ekloĝas en vaka kastelo konstruita antaŭ 250 jaroj, fare de ŝaho Mamud. Iluzie vizitas lin persa junulino, kiu estis forkaptita kaj vendita al la ŝaho por lia haremo. La bengala literaturisto Rabindranath Tagore verkis ĝin kaj aliajn rakontojn en la libro "Malsata ŝtono" (1961), kiujn tradukis el la bengala Lakshmiswar Sinha.


d) Bofratino Hianglin estis juna ĉina vidvino, kiu forkuris de sia montoregiona hejmo por dungiĝi kiel servistino en urbeto. Ŝi rolas en la novelo "Benopeta Ofero", unu el la rakontoj de la ĉina verkisto Lusin en la volumo "Noveloj de Lusin" (1974)



(sekvo de paĝo 5)

ne ekaptinte. Ilin oni rediras al si eĥe. Poste, malrapide, io malnodiĝas aŭ nodiĝas en la fundfundo de la memo. Kaj jen ekmalfermiĝis mia koro, ekmalfermiĝis la ĉielo, ekmalfermiĝis la tero, fariĝis la tuta universo paska sonorilado, kristnaskofesta kantiko kaj suno, suno. Mia patro, mia patrino, finfine mi retrafis viajn vizaĝojn vivajn kaj la amo, kiun vi estis en min enmetita reviviĝis. Alah! Kiom mi deziregis vivi, kiom mi deziregis vivi por ĉiam, eĉ se la milito estis al mi instruinta, ke "ĉiam" povas formorti en la daŭro de unu sekundo. Sed jam ne gravis "ĉiam", dum ĉiu amotraserbita sekundo entenis en si la eternecon.

tradukita de S. Boniol



(sekvo de paĝo 6)

La bronzo-epoko finiĝis proksimume ok jarcentojn a.K. Navigado disvastiĝis kaj la naturaj rodoj fariĝis la posed-celo de aliaj popoloj, maristoj kaj komercistoj, kiuj tie fondis kontorojn. Tiam alvenis la unuaj fenicaj komercistoj kaj Malto eniris la Historion.

(El dokumentoj de "Arts et Vie)

Kristnasko-festeno de l' mizeruloj

— Raymond Schwartz —

Jam de dek-kvin tagoj Macache, tiu ĉiama sentaŭgulo, havis firman oficon ĉe la Pariza Reklam-Kompanio. Lia tasko ne estis malfacila kaj ĝi apenaŭ limigis lian soifon je libereco. Sur la grandaj bulvaroj, de tagmezo ĝis vespere li disdonadis prospektojn. Dum tiu deĵortempo li verdire ne rajtis deflankiĝi de l'ordonita vojo, sed aliparte li ne estis enfermita en malvasta laborejo; li povis spiri kaj filozofi ĉar la aŭtomata gesto de la disdonado neniel absorbis lian pensliberecon. Plue, kaj tion li ŝatis, li ricevis ĉiutage sufiĉe da moneroj por akiri funton da pano kun "surajo" kaj tutan litron da ruĝa vino. Jam dek-kvin tagojn li enmanigis al la preterpasantoj tiun invition al originala kristnask-festeno en Bicherel, kies tekston li konis nun parkere. Komence li estis tiel ofte leginta kaj releginta la programon kaj menuon kun ĉiam pli tentanta antaŭĝuo, ke la nura vido de tiuj flavaj paperetoj kun la promesitaj diaĵoj vekis ĉe li frandeman avidon, kiu ne povis pli bone esprimiĝi ol per ŝmaca klakbruo de l'lango.

La 24-an de decembro 1933
kristnask-festeno en unika kadro
Izolite meze de l' arbaroj la modla gastejo
en la antikva muelejo de Bicherel proponas
al vi tiun ĉi

PROGRAMON:

Je la 2-a: Generala gajĝo — kokiĵoj kun muziko.

Je la 23-a: Ekmarŝo por ĉesteti la noktmezan meson en la preĝejo de Tremblay (2 km.)
— La tuta servistaro akompanas la gastojn lumigante la vojon per torĉoj.

Je la 24-a 1/2: Revendo el Tremblay.

Je la 1-a: Delikata festmango.

Je la 4-a: Granda farandolo — jaz-ork-estro. — Oni dancos ĝis la mateno. —
Multaj surprizaĵoj.

MENUO:

Kokinbuljono en tasoj.

Kristnaska kolbaso krad-rostita,
sur pom-kanapo

Kankroj laŭ maniero de Bordeaux

Kokido de Bresse sur roststango,
farĉita per kaŝtanoj.

Strasburga hepatpateco sur
Porto-vina gelatenaĵo.
Salato.

Glaciaĵo de Bicherel.

Frandaĵoj de l' muelejo.

Fruktoj.

Diversaj vinoj kaj ĉampanoj,
kafo kaj likvoroj.

Estis la kristnaska vespero. Duoble pezis la mizero de l'senhejmuloj pro rememoro al pli afablaj tempoj. Estis ĝene gapi al tiuj burĝoj, kiuj rapide, ŝarĝitaj per dolĉaj pakajoj, aŭŝis sur siaj fremdaj vizaĝoj larĝan rideton de feliĉaj homoj.... kaj Macache eniris en sian kutiman dormejon, abomenan keltruon en la kvartalo de l'vendhaloj. Naŭza haladzo tuj ekgratis lian gorĝon. Ftiza gasflameto anstataŭ lumigi nur plidensigis la ombrostriojn de sulkaĵaj vizaĝoj. Jen liaj kunuloj. Defalaĵoj de l'vivo. Antaŭ ol endormiĝi sur duonputraj pajlosakoj, kelkaj, kun blasfema ironio, ekzumis, kiel eĥon el fora nokto la kanton de l'festo "Naskiĝis la dia infano..."

Aliaj krudvorte ruktis sian malbonhumoron, dum la pli rezignemaj trompis malplenen de l'ventro kuntirante la zonon je du pluaj truoj. "Hej, kunuloj," Macache ilin vigligis, "venu al la festeno!" Kaj li deklamis al ili la prospekton de l'gastejo en Bicherel. Kaj tiam oni insultis lin: "Li freneziĝis!" — "Forĵetu la ebrulont!" Sed Macache konis sian planon: "Aŭskultu do, idiotoj kaj kripluloj! De la 23-a ĝis duono post nokto-mezo la gastoj kaj la tuta servistaro estos for. Ĉu vi vere ne komprenas? La kuirejo apartenos al ni, al ni la provizejo, al ni la keloj. Jen mia amiko Champignon; li ĵus malŝarĝis sian aŭton; li liveris siajn brasikojn kaj salatojn; ĝis la 3-a li estas libera. Tio sufiĉos. Gesinjoroj, envagioniĝu!" Kiel ili ekstaris! kiel ili saltis! For la dormemo! Do mi ĝissate iri povas ĉiutage, sed manĝi.. "Kankroj! kokidaĵoj! Pateco!" La ŝarĝaŭto de Champignon estis plenplena. Oni ekveturis. Tiel permite ili kaŭris, ke ili ne sentis la pinĉon de l'frosto. Jen kuŝis Balourd, la pedikpatro, — Maupois, la unukrurulo, — Miche, la almozulino de strato Rivoli, — Credieu, la ŝtelisto, — Ivan, la kozako, — Cruche kaj Rouplon, kaj ĉiuj kaj ĉiuj. Jam post unu horo la veturilo forlasis la ĉefŝoseon kaj sekvis, tra la arbaro, mallarĝan vojon al Bicherel. Kaj ili estis bonŝancaj. Jen rigardu, tiu moviĝanta linio de fajropunktoj; tio estas la gaja procesio enkadrigita de l'torĉportanta servistaro. Ne tro rapide, Champignon; lasu ilin malproksimiĝi. Kaj nun antaŭen, antaŭen nun, pezulo! Ni estas malsataj!

En Bicherel ĉio dormis. Senhezite ili eniris, unu puŝante la alian. Dikaj tapiŝoj de l'antaŭhalo moligis la takton de l'paŝoj. Agrabla varmo sorĉis sur la rigidajn vizaĝojn iom da ĝojo. Jam Macache estis trovinta la kontakt-butonojn de l'manĝoĉambrego. La subita eklumo el dekoj da kristalaj lustroj blindigis ilin. Ĉio brilis tie, la glasoj, la teleroj, tranĉiloj kaj forketoj, la tablotuko kiel neĝo. Kaj vidu, ho Sankta Naztruo! boteloj, boteloj, boteloj... Tiam venis el la kuirejo, scivoleme kaj miregante, du blank-vestitaj saŭcistoj, -sed jam post kvin minutoj ili estis enfermitaj en mur-ŝranko. Kaj komenciĝis pradia regalado. "Hej, mia ventro, larĝiĝu!" - "Je via sano, Macache!" - "Ankoraŭ iom da pasteĉo, grafino?" - "Nu, Rouplon, kion vi pensas pri tiu ĉi St-Estèphe?" Nur Miche nenion diris; ŝi glutis tutan femuron de l'kokido tiel avide, ke la grasa suko degutis de ŝiaj buŝanguloj. Kaj de tempo al tempo unu aŭ la alia eliris por flari, ĉu minacas iu danĝero. La festo daŭris. Miche, kun plena ventro, jam ronkis sub la tablo. La aliaj ridegis.

"Fuŝite!" - Kiel estis eble, ke ili nenion rimarkis? Kaj kie estis nun pli da mirego, ĉu ĉe la revenintaj noktmesuloj, ĉu ĉe la surprizataj ŝtelfestenanaj? Macache, pro malvarma ŝvitado, ektermis antaŭsentante belan petardadon. Adiaŭ libereco! La tuta bando estas kaptita kiel vulgaraĵ kunikloj.

Tiam rompis la silenton dika pastra sinjoro, supozeble la pastro el Tremblay, entute afablaspekta homo. "Gesinjoroj", li turnis sin al la gastoj. "Gloria in excelsis Deo! Kaj sur la tero paco inter la homoj. Difavoro! - Dum tiu ĉi solena tago, kiam ni festas la naskiĝon de l'Diofilo en mizera stalo de Bet-Leĥem, ni ne montriĝu severaj kontraŭ tiuj ĉi malfeliĉuloj. Ni donu nutraĵon al niaj malsatantaj fratoj, kaj se ili soifas, ni donu al ili por trinki!" Aprobante, ĉiuj aplaudis, pli amuzite ol konvinkite. Mondumaj sinjorinoj blekride konsentis: "Kiel interese! Bela surprizaĵo,...tute originala..."

Kaj jen la riĉaj sinjoroj tuj malfermis siajn cigarujojn, jen elegantaj zorge flegitaj manoj, brilantaj per ringoj kaj ungoj, prezentis likvorojn. Ĉarma blondulino, malvirt-okula, filino de aŭtentika bankisto, taŭzis la harojn de Macache kaj susuris: "Mi amos ĉin. Ĉu ci komprenas? Venu, bela bubo, hodiaŭ ci gustumos paradizan ĝojon. Prenu, mi donacas mini!" Pest! Ŝi estis bela knabinpeco.

"Ĉu mia pordo estas nun noktazilo? He, malpurulo, moviĝu! Kie do sin kaŝas la policistoj?"... Macache vekigis pro la doloro. Kolera sinjorino lin forpiedumis, dum peltkovrita sinjorino, tremante pro la matena vento, kun okuloj lacaj post traidoĉa nokto, diris nur: "Skandale! Kion faras la policistoj?"

Preninte servorte la malplanan botelon Macache ekmoviĝis, riproĉe grumblante kontraŭ tro ĝojaj preĝejon-sonoriloj, kiuj vokis al frumeso: "Fermu do viajn faŭkojn! Oni ja scias, ke estas Kristnasko..."

ni ridu

Ŝtelisto eniras domon kaj serĉas juvelojn. Li aŭdas flustradon de voĉeto: "Jesuo rigardas vin!". Li ĉirkaŭrigardas sed vidas neniun. Li daŭrigas sian "laboron". Denove li aŭdas la voĉeton: "Jesuo rigardas vin. Jesuo rigardas vin!". La ŝtelisto ektimas kaj ŝaltas la lumon. Li vidas papagon en kaĝo, kiu ripetas: "Jesuo rigardas vin!". La ŝtelisto pli libere spiras: "Uff! Nur papago. Kiu estas via nomo?" - "Fred", respondas la papago. "Fred? Stulta nomo por papago." Fred respondas: "ĉu vi ne opinias, ke Jesuo estas same stulta por gard-hundo?"

Iu viro eniras libro-vendejon kaj trankvile atendas. Venas la vendisto. La viro klarigas: "Mi eklibertemphas ĉi vespere. Mi ŝatus kunporti interesan libron." - "Nur elektu el la bretoj, sinjoro." La viro insistas: "Atendu. Mi deziras libron iom dikan; la stilo estu klara, simpla kun ne tro da personoj." - "Mi komprenas." - "Ankaŭ... Mi ŝatus, ke la temo estu pri vojaĝoj. Ĉu vi havas iun libron...taŭgan?" La vendisto vokas la deĵoranton; "Alportu al la sinjoro fervoj-horaron, mi petas."



JEAN FORGE INTERVJUIS

RAYMOND SCHWARTZ

"Nun, kara poeto, vi ne forkuros min!" mi parolis kaj direktis, esperplene, miajn okulojn kontraŭ la serene ridetantan viz-aĝon. Tuj mi atakis kuraĝe per la unuaj demandoj laŭ la rutino de longjara intervjuiisto, sed la poeto, per energia eksvingo de sia pipo, fortrancis mian frazon: "Ĉu vi estas kremkaŭlo aŭ normala homo?" li ekzamenis. "Mi kredas, ke mi havas ecojn de normalulo," mi respondis mirfrapite kaj humile klinis mian kapon, "escepte ke mi estas esperantisto."

La poeto vokis la kelneron kaj intertraktis kun li pri nova kombinaĵo de aperitivo por la fremda gasto. Francaj vortoj, kulinariaj fakesprimoj flugis tien kaj reen kaj el ĉio rezultis malhela bruna fluidaĵo, kiun la kelnero fiere metis antaŭ min.

"Je via sano, samideano!" diris la poeto kaj levis la glason. "Mia preferata aperitivo estas ja la aniza, bonvolu noti tion malantaŭ viajn ĵurnalistajn orelojn. Cetere, kiel gustas al vi?", "Tiu ĉi gustas kiel medicino," mi respondis kun acida mieno. "Kiam mi estis infano, mi devis gluti tian trinkaĵon kaj se mi ne volis, minacis batoj de flava bastono."

La poeto direktis siajn grandajn okulvitrojn kontraŭ min kaj ridetis saĝe: "Ĝi estas la medicino de l'vivo kaj la fonto, el kiu mi ĉerpas la plej bonajn ideojn..." La poeto bruligis sian pipon. Estis posttagmezo kaj la suno pikis en niajn kapojn. La homo ŝvitis kaj soifis. Antaŭ ni bruas kaj ruliĝis la trafiko de Pariza bulvarado. Ni komencis paroli pri la bela kaj interesa urbo de l'ĝojo... kaj ni rememoris la Parizan Kongreson. Ĝi estis la unua internacia Esperanto-Kongreso, kiun li ĉeestis. Mi ne povis kaŝi mian miregon. De kie li konas tiel "ĝisoste" niajn verdulojn, kiujn li sprite kaj trafe priskribas en sennombraj poemoj? Ĉu eble pere de sia "sekreta sekretario" Grenkamp. Ĉu per korespondado? Ĉu per sia iama fama "Verda Kato", en kiu regis tiu verda

atmosfera, tiu verda humoro, kies genia poeto-interpretisto li estas?...

"Oj - la karaj samideanoj," mi diris, "interesa popolo, ĉu? Oni preskaŭ povus paroli pri "verdaj moroj kaj kutimoj", kaj verki sciencajn librojn pri ili." - "Ĉu ni povas antaŭvidi, kio okazos..." - "...eble..." mi daŭrigis kun malica palpebrumo, post jardekoj aŭ jarcentoj studentoj verkos doktorajn disertaciojn pri la "verda" kulturo kaj kiel historiajn fontojn citos viajn tempo-spegulajn verkojn."

La poeto enpense ekfumis je sia pipo kaj diris nenion. "Kiun profesion vi havas?" mi demandis scivole. "Mi estas en mia privata vivo bankisto, se vi permesas," li respondis, "agrabla okupo, ĉar ĉiutage tra miaj fingroj glitas sennombraj monbiletoj. La penso, ke ili ne apartenas al mi, kaŭzas al mi ĉiutage bonan humoron." - "Enviinda homo..." mi murmuris. "Prefere eltrinku!" li admonis, "ne estas bone, kiam la aperitivo trovarmiĝas en la suno..."

Mi levis la glason, ĵetis scivolan rigardon al bela Pariza fraŭlino, kiu rendevuis kun kavaliro ĉe apuda tablo. "Vi estas fraŭlo, ĉu ne?" mi demandis. "Ne, vi eraras," li respondis. "Ĉu mi rajtas citi tion en publika revuo?" mi demandis tre singarde. "Vi rajtas," li respondis.

Jes, efektive li estas edzo. Kaj lia edzino ne nur estas ĉarma sed ankaŭ parolas Esperanton kaj estas moderna homo komprenanta la aŭdacan sonon de la liro de l'poeto, kiu ofte sarkasme ridas pri la virino, fraŭlino, virgulino. La amo kun ĉiuj siaj nuancoj frivola kaj petola ja ludas la ĉefan rolon en ĉiuj liaj poemoj kaj prozaĵoj. Li havas unu bonegan econ: li estas tre kuraĝa kaj libera en siaj pensoj, sed neniam li transpaŝas la limojn de la bona gusto.

La poeto, per eksvingo de sia pipo, vokis la kelneron. La suno pli terure pikis. La homoj ĉirkaŭ ni ekĝemis kaj viŝis la ŝviton de la frontoj. Sed ili ne ĉesis babilii kun la kutima pariza vigleco. Mi rapide notis kelkajn vortojn sur la paperon kaj klopodis elbuŝigi novan stultan demandon. Mi sentis, ke en mia kapo ekbolis la "medikamento". "Ĉu vi jam komencas ŝvebi?" demandis la poeto kun rideto kaj scivole kaj samtempe triumfe rigardis min. En miaj

oreloj obtuze bruis la aŭtobusoj, kiuj ruliĝis antaŭ ni sur la bulvaroj. La kelnero metis antaŭ min bonodorantan novan trinkaĵon. Ĝi estis la aniza... "Kial vi turmentas min daŭre per via intervjuo?" li ekridis kaj levis la glason: "ke mi naskiĝis, vi scias, kaj ke mi estas malamiko de la kremkafuloj, vi ankaŭ scias, kaj ke mi havas "pasporton tra la libera lando Esperantujo" vi ankaŭ scias. Do kion vi volas ankoraŭ skribi pri mi? Ke mi speciale ŝatas manĝi rizon kun haringoj, ke mi fumas sekigitajn rozpetalojn, ke mi speciale ŝatas bonodoron de freŝfuma sterko kaj ke mi nokte laboras por "ido" kaj tage por Esperanto, he?". Mi konsentis, ke li estas prava kaj gaje levis mian glason. "Pasporton tra Esperantujo ankaŭ mi posedas", mi diris fiere, "interesa homo la eltrovinto de tiuj pasportoj, la esperantista kelnero Ferrari. Ankaŭ inda heroo por nova poemo."

"Ĉiuj Parizanoj ŝatas lin", klarigis la poeto, "li estas unika verdulo. Super lia lito pendas granda bildo de Zamenhof kaj ĉiumatene li parolas kun la Majstro kaj demandas lin pri la programo de la tago. Neniu tago devas forpasi, en kiu li ne varbus novan adepton por la sankta afero." - "Tre interesa sinjoro, kiu per sia pasporto trafis la guston de nia popolo. Sed ankoraŭ pli interesan verdulon mi renkontis dum la Pariza Kongreso. Li estas ankaŭ taŭga inda reprezentanto, moderna Diogeno, Holanda samideano, kiu ŝovas antaŭ si dometon sur du radoj kaj tiel tramigras tutan Eŭropon. Mi opinias la ideon genia. Se pluvas, vesperiĝas aŭ se li laciĝas, li simple ekhaltas, eniras sian domon, kultras, manĝas, dormas. Same li loĝis antaŭ la kongresejo ne ĝenante la loĝejan komitaton de la Loka Kongresa Komitato."

"O, mi konas ankoraŭ pli interesan Diogenon," diras la poeto, "samideano Archdeacon loĝas sur sia jaĥto nomata "Esperanto". Vintre ĝi kuŝas en Saint-Cloud sed somere ĝi naĝas sur ĉiuj maroj." - "Feliĉa homo," mi aldonas, "kaj jen ekzistas homoj, kiuj asertas ke nur malriĉuloj kaj malgravaj homoj okupas sin pri Esperanto. Ni estu fieraj ke inter ni ankaŭ estas riĉaj homoj. Ĉu ne povus foje okazi, ke unu el tiuj riĉuloj, en sia testamento denove, por la movado fiksis iom da kapitalo? Aŭ pli...ke iu el ili havus la bonegan ideon doni

stipendiojn por malriĉaj Esperanto-verkistoj aŭ fiksis ĉiujaran verdan Nobel-premion por nia literaturo? Iom da mono al ni ambaŭ ne povus malutili, ĉu ne?" - "Vi pentras mirindajn perspektivojn," diris la poeto kun kontenta rideto kaj etendis la manon denove al la vivo-medikamento. Ŝajne li ne multe fidis la riĉulojn en nia movado; li konsolis sin per forta trink-gluto el sia glaso.

Mi rapide volis ekscii ankoraŭ ion interesan, ion sensacian, el la buŝo de l'poeto, antaŭ ol ekŝvebi en la landon de l'dolĉa forgeso. Fulmotondro! Kia obstina ne-intervjuebla poeto! "Kion vi nun verkas aŭ preparas?" mi demandis. "Malfacile respondi" - li diris purigante kaj frapante sian pipon. "Mi intencis unue verki grandan romanon pri la "verda malsano", kaj pri mia groteska batalo kontraŭ mia bopatrino, kiu estas kontraŭ Esperanto. Sed nun mi forĵetis la projekton laŭ konsilo de la Esperanto-kelnero Ferrari, kiu opinias la esperantistaron ankoraŭ ne matura por tia verko." - "Domaĝe, tre domaĝe!" mi bedaŭris. "Ni ĉiuj avidas legi novajn verkojn el via plumo, kara poeto! Pentrindaj figuroj ja svarmas, temoj pendas amase en la aero. Nur eksonigu vian lirion, dibenita orbuŝa poeto; ni aŭskultos kun ravo eĉ pri nia propra ridinda ekzisto. Rigardu, rigardu, niaj seĝoj komencas jam ekflugi, ekmovataj per la mirinda forto de via spirito kaj de la nevidebla potenco!" - "Nun mi estas feliĉa!" diris la poeto kaj denove eksvingis per sia pipo al la kelnero. Post tio li turnis sin al mi: "Mi gratulas vin, mia kara, pro tio, ke vi ne havas kafkarakteron. Tiu ĉi komuna nia ideologio, ĝi vivu kaj per ĝi la verda literaturo!" Ni levis la glasojn, kaj mi inspirite de la proksimeco de tia genia poeto, ekprenis mian kraĵon kaj "poemis" la unuan fojon en mia proza vivo:

Nun ŝvebas ni trans montoj
Sur aperitiv-pegazo
Aniz-parfumo en la nazo
Al verdaj horizontoj!..!

Ni mokas pri la familia rondo
Kaj kraĉas je la tuta mondo!
Ekflugas ni en medicin-ekstazo
Lasante nubon de terura gaso!..!

x en 1932

SUBKARPATAJ

RAKONTOJ

Plenlumo lumigis per sia ĉarma brilo la dehakitan arbaron, kies grundo estis kovrita de ĉiuseca arbustaro, multkoloraj floroj kaj herboj. Ni sidis ĉirkaŭ fajro apud krude konstruita trabdometo kaj silente rigardis la flamojn. La varma aŭgusta nokto strange impresis min., homon urbanan, kiu ne estis kutimiĝinta al tia laŭnatura vivo, kian ni vivis de unu monato en la vastaj karpataj montarbaroj, tranoktante sub la arboj post taga vagado, sen molaj kusenoj kaj kutima komforto.

La trankvilego de tiuj arbaroj fortigis miajn nervojn kaj mi sentis min tiom feliĉa, kiom neniam antaŭe. Dum la krepusko mi atingis la trabdometon ĉe kiu kristale pura akvofonto prezentis al mi refreŝiĝon. Ni estis nune kvar. Tri ĝendarmojn mi renkontis kaj ni ĉiuj ripozis ĉar la ĝendarmoj preparis sin por tutnoka rondirado.

"Jam la dekan jaron mi vivas inter tiuj ĉi montoj kaj popoloj" diris unu el la ĝendarmoj. "Mi ĉiam ja grumblas kontraŭ tiu ĉi lando, pro mia malfacila tasko ĉi tie sed, verdire, malgraŭ ĉio dolore mi adiaŭas al la lando. La arbaroj kaj ankaŭ tiu popolo kreskis en mia koro." La dua parolis: "Jes, la popolo vivas mizere. Oni ja ne povas diri, ke ĝi ne estas civilizita pro fumado de Dio scias klaj foliaroj, trinkado de brando kaj aliaj bonaĵoj. Sed la kulturo pene penetras ĉi tieajn vilaĝaĉojn. Mi povas rakonti nun instruon historieton pri tio." - "Ĉu vi aludas tiun historion kun la ŝmiraĵo?" demandis lin la tria belkreska kaj juna ĝendarmo. "Do, tiu historio ŝajnas esti kopiita el Jack London kaj se iu estus ĝin rakontinta al mi antaŭe, tion mi estus dirinta al li. Sed bedaŭrinde ĝi estas tro vera.

"En mia vilaĝo vivis riĉa kamparano Opalenik. Li estis ne malriĉa homo, posedanta multan brutaron, fekundajn kampojn en la valo kaj nenio ŝajnis manki al li. Iun tagon ŝajnis al li, ke en lia gorgo io ne estas en ordo. Li sentis ian grataĉon tie; li ne povis bone engluti la manĝon; io lin

premias. Ankaŭ lia kapo doloris. Mi ne estas kuracisto; mi ne scias ĉu vere li havis ian anginon, sed li plendis ankaŭ al mi pri siaj malgrabaĵoj. Lia bofrato Jura Tomaŝik havis tiam viziton. Vi scias ja, ke el la Rutenoj vivas la duono ĉi tie en Sudkarpata Rusujo kaj la duono en Usono. Do venis la frato de Jura por transpreni kaj vendi la heredaĵon post la morto de la patro. Dimanĉe venis Opanelik viziti Juran. La amerikano sidis apud la tablo kaj aŭskultis la interparolon, dirante kelkajn saĝajn vortojn, kiel taŭgas por mondvojaĝanto. Opanelik plendis pri siaj malsanaj gorgo kaj kapo kaj priskribis siajn dolorojn kaj ĝenaĵojn. "Mi riĉe rekompencus tiun, kiu povus min liberigi de mia malsano", li diris. "Hm," diris la amerikano pripenseme, "estas facila afero. Se vi havas monon mi povas helpi vin. Ĉe ni en Usono ni havas bonan kaj neniam malsukcesan kuracilon pri kiu mi povos zorgi. Ĝi ja kostos monon; sed mi povas al vi garantii, ke vi neniam malsaniĝos. Ekzistas ĉe ni ŝmiraĵo, farita el amerikaj herbaĵoj, per kiu sufiĉas nur ŝmiri la kolon, kaj vi estos sana por la tuta vivo. Sed oni devas unue dehaki la kapon, ŝmiri ĝin kaj la kolon, surmeti ĝin poste sur la kolon. La kapo tuj alkreskos kaj vi estos sana. Mi tion vidis propraokule. Morgaŭ mi forveturos. Post unu aŭ du monatoj vi povos havi la ŝmiraĵon. Tre ekmiris ambaŭ kamparanoj pri la mirakla kuracilo, kaj Opanelik tuj donis al la amerikano monon por aĉeti kaj sendi la ŝmiraĵon.


Pasis du monatoj. La amerikano efektive sendis la ŝmiraĵon kaj Opanelik petis Jura'n fari kion diris lia frato. Tiu, senhezite, por sanigi sian bofraton, iun dimanĉon, kiam li estis sola en la bieno de Opanelik, prenis akran hakilon kaj preparis la ŝmiraĵon. Opanelik metis fideme la kapon sur lignan blokon, la bofrato streĉis la brakon kun la hakilo kaj per unu bato forhakis la kapon de Opanelik. La kapo ruliĝis sur la grundo. Jura ŝmiris la kolon kaj la kapon per la mirakla kuracilo, poste surmetis ĝin sur la kolon, sed, ho ve! ĝi ne volis stari sola. Vane atendis Jura kvaronhoron, tenante la kapon ĉe la kolo de Opanelik. Li fine malesperis, revenis hejmen kaj sin pendigis. Kaj ni nun serĉas la fraton de Jura en Ameriko. Se mi ne havus ĉiujn dokumentojn pri tio hejme, mi neniam kredus, ke rakonto de Jack London povus esti vera."

POR VIA DISTRO

Trovotaj vortoj: Vento - Tremi - Grego -
 Rekta - Guzlo - Briko - Lasta - Citro -
 Tramo - Mosto - Pekli - Brako - Marto -
 Krem - Musko - Prozo - Visto - Sledo -
 Lundo - Krimo - Bindi - Tetro - Stelo -
 Mardo - Prezo - Busto - Blovi.

Trovota frazo: " Ne ekzistas kareso sen
 intereso"-

KRUC-VORT-ENIGMO



HORIZONTALE: 1- Birdeto. 4- Griza tavolo ŝtono. 7- Budaisma pastro. 8- Vomanta monto.
 10- Trinkajo. 11- Purigi per akvo. 12- Prepozicio. 14- Fari truon. 15- Altvalora metalo.
 17- Tegmenta kaj ŝipkajuta fenestreto. 19- Linio, ĉirkaŭ kiu turniĝas io. 21- Nepara
 nombro. 22- Kompara vorto. 24- Monato. 26- Festo. 27- Parolema birdo. 28- Rompebla
 akvo.

VERTIKALE: 2- Sanigilarejo. 3- Obeema viro. 4- Kulpigi. 5- Para nombro. 6- Metallo. 9-
 Plato el metalo. 12- Pikema besteto. 13- Ripoziga meblo. 16- Veneno farita el papavo.
 18- Kunigi de diversaj lokoj. 20- Tia estas la pura akvo. 21- Botelŝtopilo. 23- La unua
 vorto en amika letero. 25- Sovaĝa eŭropa bovo.

LA VIVO EN GRESILLON

KOMITAT-KUNVENO - DIMANĈON 14-an DE OKTOBRO 1995

Ĉeestis la kunvenon: D. kaj P. Babin, F. kaj H. Boyet, B. Cheverry, G. Dairon, G. Lagrange, P. Métivier, P. Naulet, M. Noulon, J. Vincent. La aliaj komitatanoj senkulpiĝis.

Staĝoj 1995 : En junio, malgraŭ ne tre granda nombro da staĝanoj (maksimume 35), la restado estis agrabla kaj viva. J. Turbillon grandparte okupiĝis pri la animado.

En julio la nombro da staĝanoj iom malkreskis sed la kursoj estis regule ĉeestataj. Dum la tria periodo, la 3a-grada kurso konsistis en konversacia rondo ĉar la lingvo-kono de la kursanoj estis tre diversnivela. La difino de 3-a nivelo estas tre malsama laŭ la landoj. La kursgvidantoj devas adaptiĝi al la bezonoj kaj deziroj de la kursanoj.

Dum la 4-a periodo ne ĉeestis komencantoj. La aliaj kursoj kaj prelegoj estis tre interesaj. Okazis ekspozicio de infan-desegnaĵoj. Infanoj de la apuda urbeto Baugé vizitis ĝin kun granda intereso. Ĵurnalistoj aperigis artikolon en la regiona gazeto.

Dum la 5-a periodo la staĝanoj estis pli nombraj dum la japana semajno (proksimume 60). Regis pli vigla etoso. Sinteza kunveno montris la diversajn opiniojn kaj spertojn pri la pedagogiaj metodoj montritaj dum la kursoj kaj ĉiuj ĉeestintoj reiris iom pli "riĉaj" koncerne la temon.

Dum la 6-a periodo malpli ol 30 staĝanoj ĉeestis. Malmulte vizitis la kursojn. Tiu staĝo estis kvieti kaj trankvila. Denove konstateblas ke la restad-daŭro de la vizitantoj, dum la tuta somero, pli kaj pli mallongiĝas.

La prezidanto D. Babin prezentas provizoran bilancon je la 30-a de septembro: ENSPEZOJ: Koncerne la restadojn, aliĝkotizojn kaj kulturajn aktivaĵojn, la enspezoj estas nur iomete malpli altaj ol la antaŭan jaron. Ankaŭ la flankaj enspezoj iom malaltiĝis: kuponoj, libro-servo, memoraĵoj. Ankaŭ la donacoj.

ELSPEZOJ: La salaĵoj, sociaj kotizoj, nutraĵoj, aĉetado de libroj falis paralele kun la respondaj enspezoj.

Staĝoj 1996 Pluraj vizitantoj diris, ke ili ŝatus ricevi precizajn informojn pli frue en la jaro. La kalendaro, de la diversaj staĝoj aperas jam en novembro, sed pro malfrua respondo de pluraj kontaktitaj gvidantoj ne eblas aperigi precizan programon tre frue. Metodo estus aperigi la nomon de la kontaktitaj personoj kaj korekti poste laŭ la respondoj. Ĉu pli bone?

La infan-renkonto okazos de la 13-a ĝis la 20-a de aprilo. Organizos P. Naulet. El Svedio jam aliĝis grupo da 28 infanoj, enmigrintoj el diversaj landoj sed lernantoj en la sama klaso. Multaj aliaj informpetoj alvenis el aliaj landoj. La nombro da partoprenantoj dependos ne nur de la nombro da disponeblaj litoj sed ankaŭ de la sumo partigebla por la subvencioj. Nova alvoko estas farenada por plenigi tiun kason.

La unua somera staĝo komenciĝos la 20-an de junio kaj finiĝos la 6-an de julio, kun la kutimaj kursoj, konversacioj kaj promenadoj.

La aliaj staĝoj okazos ĝis la 25-a de aŭgusto. Ĉiu daŭros unu semajnon sed la porkomencantaj kursoj etendiĝos sur du sinsekvaj semajnoj. Okazos do 7 diversaj periodoj.

La kursoj por la praktikantoj kaj la lertuloj daŭros nur po unu semajno. Ni povas jam anonci preparadon al la Atesto pri Kapableco gvidotarde J. Vincent, de la 7-a ĝis la 14-a de julio.; kurson pri gramatiko de la 21-a ĝis la 28-a de julio gvidotarde A. Cherpillot, G. Lagrange gvidos kurson pri traduk-arto de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto. Estos organizita alia kurso por instrui la francan lingvon pere de Esperanto.

Administros la diversajn periodojn: P. kaj L. Babin, Ph. Combet kaj R. Lenel, D. kaj J. Moirand, M. kaj D. Noulain, D. kaj N. Babin.

La sekretario: G. Dairon

LIBRO-SERVO

Nia libro-servo povas nun provizi vin per la "Grand dictionnaire Français-Esperanto eldonita de UFE. Prezo: 260 fr. kaj sendokostoj.

La nova katalogo ĵus aperis. Petu ĝin de S-ino J. VINCENT, 26 bis, rue de Milngavie, F-49150 BAUGE. Ankaŭ katalogo pri brokantaĵoj estas havebla je la sama adreso. Atendu fakturon antaŭ ol pagi mendon.

Niaj eldonaĵoj

POR LA PRAKTIKANTOJ: (P. Babin) - Taŭga por paroligi progresantojn.
5-a eldono - 35 fr.fr.

GRAMATIKA GVIDLIBRO: modernigita prezento - 50 fr.fr.

PREPARADO AL LA ATESTO PRI KAPABLECO: (A. Ribot) - 3-a eldono reviziita -
Prezo: 30 fr.fr.

NIAJ PERKORESPONDAJ KURSOJ

POR LA KOMENCANTOJ: Kurso per mem-korekta metodo. Tiu metodo ebligas progresadon adaptitan al la ritmo elektita de la lernanto, kiu, paŝon post paŝo, korektas mem siajn erarojn. Testo-folioj sendotaj al la korektanto ebligas kontrolon. La korektanto tiam atentigas la lernanton pri la lingvaj punktoj ankoraŭ ne bone asimilitaj.

La prezo de tiu kurso estas: 200 fr. fr.

POR LA PRAKTIKANTOJ: por akiri la praktikadon de la lingvo. Ilustrita kurso, tekstoj, gramatikaj rimarkoj, taskoj sendotaj al korektanto.

La prezo de tiu kurso estas: 200 fr. fr.

SUPERA KURSO: De- kaj al-tradukoj, atentigoj pri gravaj gramatikaj punktoj, ĉefaj eroj de la historio de Esperanto. Bona preparado al la Atesto pri Kapableco.

Prezo de la kurso: 150 fr. fr.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

LA ADJEKTIVO PREDIKATIVO

La epiteta adjektivo montras **Veran** kvaliton de la substantivo — « mi admiras la altan monton. »

LA PREDIKATIVO esprimas nian propran juĝon (sen akuzativo) helpe de kelkaj verboj tiucele uzataj (juĝi kredi, opinii, nomi...) — vi juĝas tiun filmon bona, sed mi trovas ĝin malbona).

RIM : la predikativo neniam tuj antaŭas la substantivon :

- mi vidas la ludantajn knabojn (epiteto)
- mi kredas la knabojn ludantaj (predikativo).

Opinioj diversaj



Ĉu vi kredas bona okupado tiun trikadon ?
mi trovas pli admirinda la ĉitiean pejzaĝon.

Kiu ĝenas kiun ?



Estas laciĝe : mi ne povas endormiĝi ! tiun manieron voki min ĉiun kvinan minuton por scii ĉu mi dormas, mi trovas tute nebona !

Miskompreno



Oni faras ĉion, kion oni povas por kreskigi la ekonomian revigliĝon de nia lando, kaj jen via dankemo

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Belgio : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - Pĉk : 000.0152140-44 (560 B.F.).

Britujo : John C. Rapley, 17 The Grange, Shepherdswell, Dover, Kent CT 15 7 Q B. (10 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).

Germanujo : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609) (25 D.M.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10-D 03003 ALICANTE - (1 700 peset.).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (20.000 liroj).

Japanio : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol.).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugallio : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboa (2.800 esk.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).

Svislando : Esperanto Perkoresponde, Claude Gacond, strato Chevreuils 14, CH-2300, La Chaux-de-Fonds, PK.23-4669-1 (22 s.f.).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34